# *Kubo memoras Fidel Castro en la tria datreveno de lia forpaso*



Havano, 25 nov (RHK) Pasis tri jaroj de la forpaso de la historia gvidanto de la kuba Revolucio, Fidel Castro, kaj la kuba popolo memoras lin per diversaj aran?oj,  kiuj celas diskonigi kaj savgardi lian hereda?on.

La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel, per la socia reto Twiter skribis, “kiel memorigi Fidel? Alprenante lian heredajcon, alfrontante kura?e kaj firme la imperiismon, laborante kaj pensante pro kaj por la popolo, batalante por ke pli bona mondo estu ebla.”

La kuba realo evidentigas la korinklinon de la kubanoj al Fidel, kaj pluraj centoj ?iutage vizitas la tombejon Santa Ifigenia en Santiago de Kubo por memorigi lin kaj esprimi sian admiron.

La? statistikoj de tiu institucio, dum tiuj ?i tri jaroj pli ol miliono 800 mil personoj vizitis la tombejon por esprimi diversmaniere respekton kaj admiron al la historia gvidanto.

La? la raportoj, ?irka? 270 mil eksterlandanoj de pli ol 80 landoj estas inter la vizitantoj al la tombo de Fidel Castro en la heroa urbo Santiago de Kubo.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/208260-kubo-memoras-fidel-castro-en-la-tria-datreveno-de-lia-forpaso

# Radio Habana Cuba